

ENHAVO:

1. KONFERENCO DE CxEA
2. INTERNACIA PAROLIGA SEMAJNO
3. UEA HAVAS NOVAN ESTRARON
4. VIRTUALA EKSPozICIO PRI ESPERANTAJ BILDKARTOJ
5. KALENDARO de E-ARANGxOJ EN CxEHxIO kaj ORGANIZATAJ EL CxEHxIO
6. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (OFICIALA ORGANO DE CxEJ)

1. KONFERENCO DE CxEA

La konferenco de Cxehxa Esperanto Asocio okazos cxijare en Poliĉka jam dum la semajnfino de la 21-a gxis la 23-a de septembro. Estas la plej tauxga loko, kie vi povas ekscii pli pri CxEA kaj esperanto-movado gxenerale, sed ankaux mem kontribui, eventuale starigi demandojn kaj instigojn al la funkciuloj de CxEA. Partopreni povas ankaux nemembroj de CxEA. Ne pretervidu, ke ekde la 1-a de septembro la aligxkotizoj altigxas kaj do ne plu hezitu kaj aligxu

tuj! Vi povas aligxi rekte cxe <http://esperanto.cz/konference/> aux cxe podhradska@volny.cz.

Atentigo por tiuj, kiuj ne konas sian membronumeron de sia legitimilo kaj momente ne kunhavas la kovrilon de Starto (kie gxi enestas super via nomo) aux nemembroj de CxEA: bv. skribi kiel varian simbolon unikan numeron (ekzemple naskigxnumeron) kaj nepre informu pri via pago la kasiston Vratislav Hirs (hirs@gm.vyskov.cz), ke li povu vicigi vian pagon al via aligxilo. Bedauxrinde oftas pagoj de nekonataj sendintoj.

2. INTERNACIA PAROLIGA SEMAJNO

Jam tradicie InPaSem okazos en Dobřichovice, cxi-foje senpere post la konferenco de CxEA. Ni esperas, ke almenaux iuj el la eksterlandaj partoprenantoj venos pli frue por povi cxeesti ankaux nian konferencon. Kiel tradicie, la kurson de komencintoj gvidos per cxe-metodo Stano Marĉek el Slovakio uzante sian sukcesplenan lernolibron Esperanto per rekta metodo, la seminarion por progresintoj gvidos alterne Marek Blahuš kaj Petro Chrdle. Oni diligente studos cxiun antauxtagmezon, dum posttagmeze ekskursos en Prago kaj Bohemia Karsto. Se vi intencas partopreni kaj ne ankoraux aligxis, bv. decidigxi se eble tuj, cxar ni jam devos baldaux fermi la cxambroliston por la pensiono kaj malmendi la neuzotajn cxambrojn. Sabate la 29-an de septembro okazos tradicie renkontigxo de la kursanoj kun cxehxaj esperantistoj, al kiu estas kore invitataj cxuij interesatoj. Por kompletigo, gxis nun aligxis krom cxehxoj partoprenantoj el Francio, Svisio kaj unu el Germanio. Informoj: <http://www.kava-pech.cz/inpasem> aux cxe chrdle@kava-pech.cz.

3. UEA HAVAS NOVAN ESTRARON

Dum la Universala kongreso de Esperanto en Jokohamo finis la elektoperiodo de la malnova estraro de UEA kaj estis elektita estraro nova. Jen la listo de la novaj estraranoj kun la indiko de iliaj respondecoj: Prezidanto Probal Dasgupta respondecas pri kunordigo kaj gxenerala planado de la agado. Vicprezidanto Ranieri Clerici gvidos la eksterajn rilatojn de la Asocio, alia vicprezidanto

(ununura reelektita de la antaŭa estrara skipo) Claude Nourmont respondecas denove pri edukado, kulturo kaj kongresoj. Barbara Pietrzak, gxenerala sekretario, okupigxos ankaŭ pri informado.

Loes Demmendaal estas estrarano pri financo kaj administrado, Hori Yasuo pri landa kaj regiona agado kaj Jose Antonio Vergara pri faka kaj scienca agado de UEA. Pli da informoj pri UK vi trovos en Starto n-ro 3/2007, kiu aperos en septembro.

4. VIRTUALA EKSPozICIO PRI ESPERANTAJ BILDKARTOJ

La ekspozicio prezentas 1439 fabrike produktitajn Esperantajn poŝtkartojn.

La kompilantoj estos dankaj, se vi povus helpi klarigi tiujn nekonatajn kartojn. Kaj se vi alsendas Esperantan bildkarton, ne videblan gxis nun en la ekspozicio, volonte oni aldonos ankaŭ vian nomon al la listo de subtenantoj-kunkolektantoj. Cxiukaze, nepre vizitindas:

<http://www.eventoj.hu/bildkartoj/index.htm> Gratulon al la kompilantoj de tiu unika montrofenestro de Esperantujo!!

5. KALENDARO de E-ARANGxOJ EN CxEHxIO kaj ORGANIZATAJ EL CxEHxIO

2007-09-08: Postferia E-Renkontigxo en Strakonice. Inf.:

esperanto.pisek@seznam.cz

2007-09-08: E-renkontigxo en Litomyšl kun prelego pri Svedio. Inf.:

flidr.josef@lit.cz

2007-09-12/16: La 16-a konferenco de IKEK (Internacia Komunista Esperanto-Kolektivo) en Dobřichovice apud Prago. Inf.:

dieter.rooke@tiscali.ch

2007-09-21/23: Konferenco de Cxehxa EsperantoAsocio en Polička.

Inf.: podhradska@volny.cz

2007-09-24/30: InPaSem 2007 (Internacia Paroliga Semajno), kurso por komencintoj kaj seminario por jamaj parolantoj en Dobřichovice apud Prago.

Inf.: <http://www.kava-pech.cz/inpasem> aux chrdle@kava-pech.cz

2007-10-06: Svitavy. Renkontigxo kun posedanto de bieno en Sudafrika Respubliko, trarigardo de afrikaj trofeoj, surprizo. Inf.:

dvor.libuse@seznam.cz

2007-10-12/14: Jarkonferenco de Cxehxa sekcio de IFEF en Liberec. Inf.:

AnnaAbelovska@seznam.cz

2007-10-15/21: 25-a semajna lingva seminario en Skokovy. Inf.:

drahotovaesperanto@seznam.cz.

2007-11-30/12-02: La 19-a IFK (Internacia Kultura Festivalo) en Ústí nad

Labem. Inf.: m.smycka@seznam.cz

2007-12-15: ANKRO, Antaŭkristnaska Renkontigxo en Písek. Tradicia Zamenhofa kaj Kristnaska rita programo kun tombolo. Inf.: esperanto.pisek@seznam.cz

2008-02-16/25: Flugkaravano al Barato (Hindio) kaj Nepalo lige al la 5-a Asia Kongreso de Esperanto. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

2008-04-04/06: Sabla Printempo en Písek, turisma, kultura kaj faka programo (dauxrigo de la seminario "Esperanto en la reto". Inf.: esperanto.pisek@seznam.cz

2008-06-29/07-12, -07-13/26, -07-27/08-09. Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, la Esperanto-arangxo kun la plej longa tradicio en Cxehxio, jam kvinan fojon en la sama loko! Cxiutaga antauxtagmeza lauxelekta instruado de lingvo (cxiam ankaux Esperanto elekteblas). Inf.: podhradska@volny.cz

2008-07-18/27: Autobusa karavano al la 93-a Universala kongreso de Esperanto en Roterdamo. Inf.: mirka.tomeckova@seznam.cz

Somero: EKOTUR 08, Tradicia ekoturisma renkontigxo por biciklantoj kaj piedturistoj.

Unusemajna, proksime de Prago, probable en dua duono de auxgusto en Karlštejn, dato kaj loko precizigota. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

2008-11-07/09: KAEST 2008 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Dobřichovice. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Cxehxio aux organizataj el Cxehxio. La eventojn en eksterlando vi trovos cxe <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

Cxu vi ne trovis vian arangxon en la listo? Ne kupigu nin, sed vin mem, ja ne eblas envicigi eventon, pri kiu ni ne konscias. Pri la preparataj arangxoj bv. sendi informon al chrdle@kava-pech.cz, ke gxi povu esti envicigita en la venontan Kalendaron.

6. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (OFICIALA ORGANO DE CxEJ)
Pro foresto de la redaktoro de cxi tiu regula rubriko kaj prezidanto de CxEJ Marek Blahuš cxi-foje vi ne povas legi pri la aktivecoj de nia junularo. Sed sciu, ke ili dum sia plej cxefa ago-periodo, nome la somera libertempo, ne malagas, kaj ni gxojatendu la venontan raporton en CxEA-retkomunikoj 4/2007.